

W. Bormann

Mondkomerco
kaj Lingvo

Dr. Werner Bormann

Mondkomerco kaj Lingvo

Studmaterialo por kursoj
de la Akademio Internacia de la Sciencoj
(AIS, San-Marino)
konsistanta el prelegoj
de la Internaciaj Kongresaj Universitatoj
dum la Universalaj Kongresoj de Esperanto
en Rotterdam (paĝo 3)
kaj en Havano (paĝo 23)

Eldonita de la aŭtoro en Hamburg 1993

K o m e r c o

s t i m u l a s

k o m p r e n i ĝ o n

Kompreniĝo estas anima rendimento. La homoj konatiĝas kun iu konstelacio de fremdaj fenomenoj kaj ekhavas pozitivan aŭ malagrablan senton. La menso konstatas la faktojn kaj pesas ilin.

La intelekto prilaboras la tuton de la impresoj. Ĝi klopodas pri klareco, kio prezentiĝas kaj kial ĝi estas tia. Ĝi bezonas komprenon pri la ekkonitaĵo, sen kio ties fremdeco ne povas malaperi. La kompreno estas necesa, ĉar nur el ĝi povas evolui en pli bona kazo la kompreniĝo.

Atingi kompreniĝon estas celo en la internaciaj rilatoj. Esperanto laboras sur tiu ĉi kampo. La Internacia Lingvo ebligas komprenon en tre reala senco, nome per lingvo, la rekta transportilo de ideoj kaj sentoj. Ke el tiu kompreno rezultas kompreniĝo, estas konvinko, sur kiu konstruiĝas la tuta idealista movado de Esperanto.

Kompreniĝo estas nocio el la spirita mondo. Homoj perceptas kion ili vidas eksterhejme, kaj kun kompreniĝo ili povas klarvidi motivojn kaj intencojn kaj akcepti, almenaŭ toleri ilin. Kompreniĝo estas bazo por paca kunvivado, kaj el ĝi fontas interkompreniĝo, tiu alta idealo.

La alia titolvorto, komerco, priskibas aferon de ciferoj. La homoj vendas kaj aĉetas sur la merkatoj enlande kaj internacie. Ili volas, ke iliaj agoj alportu utilon al ili - profito estas mezurilo de la sukceso.

La rilatoj inter la komercistoj estas konkurencaj, do unu kontraŭ la alia. Ciu ja volas perlabori monon, kiun nun la alia ne ricevas. Vivosfero, kiu tiel subiĝas al kalkuloj, estas sobra, materialisma.

Unuavide do ambaŭ kampoj de homa aktivado, komerco unuflanke kaj kompreniĝo aliflanke, havas malmultajn, eble neniujn rilatojn inter si, eventuale nur iujn tuŝpunktojn.

Tio estas ĝenerala konvinko. Komercistoj konkeras fremdlandanojn, ĉu nur per varoj, ĉu kun potenco tirata post si. La komprenema fremdulo alproksimiĝas alimaniere.

Kaj tamen la reciprokaj influoj estas grandaj. Komerco estas interŝanĝado de varoj kaj servoj ankaŭ trans limojn de la unuopaj ŝtatoj. Ĝi do metas la homojn en kontaktojn kun la vivĉirkaŭoj de fremduloj apartenantaj al aliaj popoloj kaj ebligas ekkonojn. Post tio venas kiel sekvanta ŝtupo: kompreni.

Aldoniĝas multaj personaj renkontiĝoj trans la limojn de la nacioj. El ekonomiaj kaŭzoj la homoj alproksimiĝas. Kompreniĝo estas unu el la konsekvencoj.

*

Komerco transiras la limojn. Al importanta

lando la varoj el la eksportanta lando montras, kion la homoj tie bezonas por konduki sian preferatan vivon. Konsumajtoj kaj investaĵoj fariĝas similaj aŭ eĉ la samaj en multaj partoj de la mondo, ĉefe en homogena grupo de ŝtatoj. La vivo ĉirkaŭ la terglobo unueciĝas - ĉar temas ĉi tie pri efikoj de komercado: koncerne la aĵojn ĉirkaŭ la homo.

Tre tipa reprezentanto de internacia identeco de varoj estas la vestaĵoj kaj ilia ŝanĝiĝo, la modo. Kio ekaperas en unu aparte progresinta lando, rapide distribuiĝas en la tuta mondo sur la vojoj de la eksterlanda komerco.

La striktaj viraj vestaĵoj el la norda hemisfero kutimiĝis ĉie ajn, ankaŭ en tropikaj landoj. Kvankam tie regas sunbrilego, estas neeviteblaĵo por deculo de vira sekso volvi kravaton ĉirkaŭ sia kolo, eĉ se ĝi efikas strangolete.

La virinoj uzurpis en preskaŭ ĉiuj landoj paŝo post paŝo la pantalonon. Ĉie disdubiĝas la kostumoj al formala vestaĵo unuflanke kaj tiu por la tempo de rilaksado aliflanke. Tre bona ekzemplo por samkutimiĝo estas la triumf-iro de la ĵinzo.

Ankaŭ la oferto de la kuirarto establis internaciajn normojn. La franca kuirmaniero estas ne nur mondfama, sed monde renkontebla. Sed ankaŭ germanaj manĝaĵoj akiris fremdlandajn merkatojn. La "stekdomo" kun amerika viando estas kutima.

En ĉiuj nur iom pli grandaj urboj ekzistas restoracioj el 30 ĝis 50 naciaj kuirartoj,

kun ĉinaj manĝejoj ĝis italaj picdomoj ĉepinte; gastejestroj el la propra nacio fariĝas raraj.

Plue, dum la diurno la homoj havas ĉirkaŭ si meblojn laŭ la modo. Fine de la pasinta jarcento la ĉambroj estis plenplenaj, nun elstaraj skandinaviaj objektoj ornamas la loĝejojn. Tio formas la hejman vivstilon kaj tiel gravan parton de la individua sinteno.

Pro importoj, libertempuloj konatiĝas kun la novaj sportiloj, laste la surftabuloj. Fariĝas la samaj, la okupiĝoj ankaŭ ekster la laboro.

En la profesia vivo importitaj iloj dominas. Maŝinoj havas unuecan mondmerkaton. Ĉiu strebas al aktuala ekipaĵo kaj tial establiĝis en internacia komparo laŭgrada aranĝo en moderneco. Kun tiu precizigo eblas konstati, ke ĉie ajn la samaj produktiloj estas en uzo. Alie ja ne eblus por la fabrikoj elteni la mondkonkurencon.

Do ĉiu aĉetas ĉe pli progresintaj produktantoj. Tio validas ne nur por fabrikoj, sed ankaŭ por la oficejoj. Guste tie ĵus okazis revolucio en ekipado per la ĝenerala uzo de komputiloj. Tiel kontoroj tute ŝanĝis siajn vizaĝojn.

*

La ĝis nun priskribita translima komerco kun ĝia fluo de varoj estas tamen nur la videbla parto de la tuto, ĝia surfaco. Sub ĝi okazas multe pli grava fluo: tiu de la kutimoj kaj de la pensmanieroj. Tio estas konsekvenco el la fakto, ke principe aĵoj estas uzataj

sammaniere. Do el aĵoj sekvas ecoj.

Maŝinoj en fabrikoj kaj kontoroj necesigas la saman trakton. Por labori kun ili la homoj devas apliki sintenon karakterizitan de pluraj ecoj: precizeco, akurateco, kapablo je kunlaboro, disciplino, zorgemo, subordigo, afereca konduto, orientiĝo al antaŭfiksitaj celoj, pureco, iniciativo, planiteco.

Cio ĉi eblas nur post lernado kaj studado, do surbaze de alta klernivelo. Kune tiuj kvalitoj formas la vivstilon de la socioj en industriŝtatoj. Ili transportiĝas tra la mondo kun la importoj, kiuj estas bezonataj por plialtigi la vivnivelon, tiu baza celo de ĉiu socio. Tiel la vivo fariĝas pli simila en la tuta mondo.

Unu aparta elemento en la situacio en la mondo estas la ŝanĝiĝinta pozicio de la virinoj. La emancipiĝo jes estas politika postulo, sed ĝi enprofundiĝas pro la ne plu malhavebla partopreno de virinoj en la profesia vivo.

Tiel malfermiĝas por la ina sekso la du ebloj: trovi la penumiĝon de sia vivcelo en familia vivo aŭ en profesia ĉirkaŭo se eble kun kariero. Ke virinoj troviĝas en ĉiuj specoj de laborlokoj ankaŭ en multaj elstaraj, tio videbligas kaj fiksigas la samrajtecon. Ankaŭ en islamaj ŝtatoj kun ilia forta subpremo de virinoj ne plu eblas la kvazaŭa enkarcerigado de virinoj en la loĝejoj, ĉar ili estas simple bezonataj en la ekonomia vivo.

Dum la laborhoroj la kondiĉoj asimiliĝis.

Tio ebligis al la homoj kompreni, kial alilandanoj tiel kondutas. Tiu plisamiĝo de la vivo koncernas ankaŭ la liberan tempon. Do kion la homoj faras dum vesperoj, semajnfinoj kaj ferioj, tio fariĝas tre simila indiferente de la civitaneco al iu ŝtato.

La tuta vivarto estas en alproksimiĝo. Unu konstato sufiĉu por ilustru tiun tezon: sen kontestoj ekzistas la aserto, ke la ĵinzo ne estas unuavice vestaĵo, pantalono, sed ke ĝi estas vivstilo.

Antaŭe fermitaj landoj reintegrigas en la fluon de la mondaj aferoj post falo de siaj baroj per importoj. Tipa usonaĵo estis por germanoj post ilia enfermiteco dum la milito la simbolo de la nove akirita libereco: mi, estante infano tiam, bone memoras kiel elstaran tian produkton la maĉgumon, kies gustumado videbliĝis per la tipaj moviĝoj de la makzeloj. Tio estis por ni pruvo pri nia statuso kiel mondcivitanoj.

Nun novaĵoj pli rapide distribuigas ĉien: porteblaj kasedaparatoj (konataj sub la varnomo "walkman") ŝtopas la orelojn de junuloj en ĉiuj metrooj de la mondo, la altkvalitaj sondiskoj kun diĝita storo (konataj kiel "kompaktdiskoj") malfermis novajn negoceblojn por la muzikindustrio.

Kun ĉiuj varoj eksportiĝas uzmanieroj kaj vivstilo. Se fremdulo kondutas tiel familiare, li aŭ ŝi ne povas esti barbaro. Evidente tia fremdulo estas kunhomo.

La varkomerco estas nur unu parto de la eksterlanda komerco. Apud varoj iras trans limojn servoj kaj aliaj nemateriaj produktoj. Oni povas ĝui asekuran helpon el eksterlando. Oni povas deponi sian monon en eksterlanda banko.

Veturante en sia regiono tamen eksterlande oni disponas pri la riparejoj kaj servostacioj de sia propra aŭtotipo. La atmosfero tie estas la de hejme konata. Ankaŭ servoj kreas senton de malfremdeco.

Ci tie listiĝas ankaŭ la eksporto de kulturaĵoj kaj lige kun tio la importoj. Temas pri la spiritaj faritaĵoj de unu popolo kaj de ties kulturkreantoj.

Gazetoj, revuoj, libroj, radiosendaĵoj kruciras la limojn, ĉu en originala lingvo ĉu en traduko por faciligi la akcepton en eksterlando. Tiel spirita influo pludoniĝas. Bedaŭrinde ĝi ne estas multflanka, sed limiĝas al malmultaj donantaj kulturoj kaj abundo da akceptantaj. Tio signifas, ke per kultureksporto iuj nacioj praktikas spiritan influon super aliaj.

Aparta kazo de eksporto estas la amuzmuziko. Ankaŭ melodioj estas komercaĵoj, unue iliaj sonportaĵoj kiel diskoj aŭ sonbendoj, sed ankaŭ la sonoj mem, estigantaj pagdevon al la eksterlandaj komponistoj. En nazia Germanio regis strikta malpermeso kontraŭ usonaj melodioj de ĵazo kaj svingo. En mia loĝurbo la sekreta polico rigardis la "svingjunulojn" kiel specon de germana rezista movado.

Tiu persekuto de sonoj ripetiĝis plurfoje.

Gi trafis klasikan muzikon el Eùropo en kulturrevolucia Ĉinio sub la kvarpersona bando. Gi direktis sin kontraù popmuziko venanta el Usono kaj Britio al iuj islamaj kaj ankaù socialismaj landoj, kiuj volis teni puraj siajn kulturajn aùtonomiojn.

La importdeziro ĉefe de la juna generacio estis tiel forta, ke ofte la registaroj ne povis plu kontraŭstari. La popmuziko rompis la unuan breĉon en la rigidan ŝirmadon kontraù fremdaj influoj.

Kio estas kultureksporto, tio fariĝas plej klara en la komercado de filmoj por kinejoj kaj televido, tiukaze ankaù, eble eĉ ĉefe de serioj. En filmoj la aktoroj montras, kiel decas vivi.

Ĉar eksportitaj estas la plej sukcesaj film-strioj, la modeloj estas nepre bonaj kaj instigaj. Kiel la figuroj en la filmoj kondutas, tio estas la imitindaj ekzemploj. En la spektantoj estiĝas la deziro vesti sin kiel la modeloj, havi iliajn meblojn, manĝi kaj trinki la samajn produktojn, resume: la vidigo de la vivstilo tiras post si importojn de varoj.

Kulturo aperas ĝenerale en formo de lingva esprimado. Do ĝi estas ligita al lingvo. Tial kulturo disvastiĝas plej facile en lingve homogenaj landoj. Ekskolonioj, nun liberiĝintaj ŝtatoj, ĝenerale konservas la lingvojn de siaj antaŭaj regantoj. Tiel ili restas firme ligitaj en siaj malnovaj strukturoj jam pro la lingva unueco.

Tiurilate la angla elstaras. Gi estas la lingvo de la ĉefa eksportanto de kulturajoj,

kaj ĝin parolas plej multaj landoj kun iliaj konsumantoj. Tra la lingvo, hegemonia kulturo altrudiĝas en fremdlandojn kaj enpremas siajn varojn favore al propra pluriĉiĝo, kio donas bazon por eĉ pli da kulturaĵoj.

Nuntempe ni troviĝas en la fazo de rapida pliaplikado de telekomunikiloj en la tuta mondo. Fariĝis eble vidi eventon ie en la mondo samtempe en la loĝejoj de ĉiuj kontinentoj.

Estas rava imago, ke centoj da milionoj da homoj, se ne miliardoj sur la tero, sam-momente ĝuas la saman okazaĵon sur la ekranoj de siaj televidiloj. Tion oni ne kreis por peri al la homaro tiel unuecan aventuron, sed ĉio estas komercaĵo.

La lanĉado de satelitoj estas multekosta lukso. La raketoj estas posedaĵoj de publikaj instancoj aŭ de entreprenoj apartenantaj al la ŝtato. Sovetio ja pioniris tiukampe kun sia sputniko, sed tiu socialisma ŝtato rezignis oferti siajn lanĉokapablojn en la telekomunikada merkato.

En ĝi regis Usono. Ĝi vendis raketlanĉojn, kaj ĉiu komprenis tion kiel pruvon de ekstrema ekonomia potenco. Tiam la eŭropanoj unuigitaj eniris tiun ĉi merkaton. Ankaŭ Ĉinujo engaĝiĝis.

Malaperis la usona monopolo. Se hodiaŭ iu volas havi sendosateliton en la orbito, tiu renkontas oligopolan proponadon. Ni parolas pri disvastigo de informoj kaj de kulturaĵoj tra la tuta mondo, sed prave uzas terminojn el komerco.

La teknika evoluo en telekomunikado daŭras. Ĉiu loko estas ligita kun ĉiu alia loko sur la tero per telefono. Iuj poŝtadministrejoj ne bone zorgis pri modernigo kaj ret-amplekso, tiel ke ekzistas malfaciloj ilin ennodi. Aliaj estas survoje aldoni la bildon al la parola informo.

Estas diversaj ŝtupoj de perfekteco, sed kiel tuto la mond vasta reto funkcias. Tio estas facile komprenebla el teknika aspekto, sed tamen restas la sento de miraklo.

Sidante je mia skribtablo hejme en mia bangalo en norda Eŭropo mia telefonaparato surtable, nun tuŝebla per mia mano, estas rekta ligilo al la tuta mondo. Insuloj en Yukon-rivero en norda Kanado estas same facile atingeblaj kiel Hongkong - aŭ kiel mia domnajbaro. Tiu komerca oferto kreas en siaj uzantoj nepre la senton de mondcivitaneco.

La servoj en eksterlanda komerco alproksimigas la homojn eĉ pli ol la vareksporto kaj -importoj. Ili havas la samajn ĝuindaĵojn, informojn, ekkonojn, rigardatajn travivaĵojn.

Ekzemple Olimpiaj Ludoj tiras konsiderindan parton de la homaro al la ekranoj, kaj ĉiuj vidas samajn eventojn. Restas popolaj specialaĵoj, iuj preferas tiun sporton antaŭ alia, kaj la arabaj televidiloj ne montras virinajn konkursojn.

Tamen tiom da samaj spertoj, eĉ se nur konsume akiritaj, faras la preferaskalojn similaj. Tiaj homoj facile komprenas unu la alian. Kompreno, la antaŭŝtupo de kompren-

iĝo, estas atingita. Nun la spirito povas klopodi pri kompreniĝo.

*

Gis nun la eksterlanda komerco staris en la centro de la rezonado pro siaj rilatoj al interkompreniĝado. Tio havas sian kaŭzon en la fakto, ke la internacieco de la ekonomio esprimiĝas plej klare en tiu ĉi translima komerco.

Tamen la komerco sole ne sufiĉas por komplete prezenti la efikojn, kiuj venas el la ekonomia aktivado al alformado de pli unueca mondo, en kiu kompreno de fremduloj estas pli facila. Tria efikanta varianto, post varoj kaj servoj, estas la homo mem en fremda ĉirkaŭo.

Ekonomiaj kaŭzoj kondukis al multaj restadoj de homoj en eksterlando. Milionoj da laboristoj troviĝas ofte dum jardekoj en malhejmaj ŝtatoj. Ili ne estas enmigrintoj, sed restas nur dum iom da tempo en la nova lando, kiel gastoj. Tial oni nomas ilin "gastlaboristoj", termino nun ennestiĝinta en la suplemento de Plena Ilustrita Vortaro de 1987.

Okazas konstanta fluo de homoj el pli malriĉaj patrujoj al prosperaj landoj. Tie ili konatiĝas kun ties vivstiloj, kaj ili ankaŭ konatigas siajn manierojn.

Du konsekvencoj rezultas el tio. Unuflanke densa kunestado kondukas al problemoj, el kiuj estiĝas iu malamo al eksterlandanoj inter la civitanoj. Aliflanke la konstatebla ekzemplo de eksterlandana apudvivado

instigas multajn komprenemulojn sin dediĉi speciale al tiu ĉi afero.

Spirite viglaj personoj, ofte opinigvidantoj, sin turnas helpeme al siaj eksterlandanoj kaj admone al siaj kuncivitanoj. La ekzisto de gastlaboristoj vekis problemkonscion.

La amaso de la eksterlandaj laboristoj trovis okupojn en simplaj taskoj. Tiuj elstaras en la publika opinio. Sed multaj eksterlandanoj troviĝas en altrangaj pozicioj en oficejoj. Tio estas konsekvenco el la internaciigo de la ekonomio.

La celo, perlabori sian salajron, kondukis milionojn da homoj el ĉiuj sociaj tavoloj al fremdaj landoj por daŭro. Tio estas jam ioma miksiĝo de popoloj.

Gastlaboristoj inkluzive de eksterlandaj oficistoj en gvidaj funkcioj estas ankaŭ gepatroj. Ili restas ekster siaj hejmlandoj kune kun siaj infanoj, kiuj nun kreskas en por ili fremda ĉirkaŭo. Dum ili ludas kun aliaj samstrataj infanoj, frekventas lernejojn, membras en junulorganizaĵoj, vizitas diskotekojn, lernas profesion aŭ studas, ili ensorbis la atmosferon kaj la etoson de sia nova loĝlando.

En la nova generacio enradikiĝas de frua infanaĝo kun ĝia profunda impresiĝemo scioj pri kunvivado. Tio validas por la enlandanoj kaj por la eksterlandanoj, kiuj ja dumtempe vivas enlande. Tiu kunvivado ebligas al tiuj homoj havi reciprokajn komprenon kaj en bona kazo kompreniĝon.

Cetere sufiĉe multaj dungitoj laboras en fremdlanda ĉirkaŭo sen forlaso de sia hejmlando. Ili restas ok horojn tage aŭ pli en entrepreno kun ĉefsidejo en eksterlando, kiu de tie kunprenis siajn laborkutimojn kaj normojn al la nova loko.

Brazilano en la kompanio VW de Brasil renkontas tie germanajn laborkondiĉojn, kaj la dungitoj de la usona komputilentrepreno IBM subiĝas en multaj landoj al la idealoj de tiu ekonomia giganto.

Alia varianto de konatiĝo kun eksterlando estas la turismo, kiu estas grava ekonomia branĉo. Multaj ŝtatoj sen industrio por eksporti aŭ produktantaj nur ne komerceblajn artiklojn trovas en turismo la solan eblon ekvilibrigi siajn pagbilancojn. Tial turismo estas nepra parto de rezonado pri eksterlanda komerco, ĝi estas ja tia eksterlanda komerco mem.

Feriaj restadoj en eksterlando ebligas al homamasoj konatiĝi kun aliaj landoj ĉu najbaraj ĉu foraj. La kontaktoj kun la enloĝantoj de la vizitata lando estas malstrikta kaj stampitaj de ilia ekonomia karaktero. La turisto estas kliento kaj ĝenerale ne scivolema fremdulo serĉanta amikecon.

Kvankam en turismo temas pri la rilato inter paganto kaj servanto, tamen la eksterlanda etoso estas nepre impresa. Turisto ekkonas fremdlandon, konas ĝin kaj komprenas ĝian vivmanieron.

Malfacile imagebla estas militiro de la sama homo en la saman landon. Guste la turismaj

landoj estis dum jarcentoj batalkampoj, sed tiam ankaŭ ne jam ekzistis la paca vizitado fare de turistoj.

*

Trafiko estas alia branĉo de la ekonomio en densa kunligiteco kun komerco. Negoci eblas nur kun transportoj per trafikiloj. Estas taŭge en prezento de eksterlanda komerco prilumi almenaŭ marĝene la rolon de la trafiko en la formiĝo de pli unueca mondo. Ĝi estas absolute esenca.

La trafikiloj ligas urbojn, regionojn, landojn, kontinentojn rapide kaj relative malmultekoste. Post la kuntiriĝo de la mondo per la modernaj telekomunikiloj estas tute konkrete la trafikiloj, kiuj realigas la atingeblon de ĉiu loko. La ekzisto de la moderna trafiko faras ke la homoj en la industriaj ŝtatoj povas senti sin teranoj.

Mondaj organizaĵoj kiel Universala Esperanto-Asocio ne povus ekzisti sen moderna trafiko. Do ili ankaŭ ne povus fari siajn tutmondajn klopodojn kiel en la kazo de UEA ĝia paciga kaj popolinterkompreniga laboro.

Monda politiko ne estus ebla sen nuntempaj trafikiloj, ĉu de la grandpotencoj ĉu en Unuiĝintaj Nacioj. Eksterlanda komerco restus en la kvantoj de kameltransportoj aŭ de velŝipoj, do praktike sensignifa, sentebla nur ĉe specialaĵoj kiel spicaĵoj.

Kompreneble la tuta sektoro de la trafiko estas parto de la ekonomio same kiel la komerco, kaj tial ĝi havas lokon ĉi tie.

Teknikaj eltrovaĵoj estas la bazo por la trafiko, sed ili restus nerealigitaj, se ne eblus profiti el la proponado kaj vendo de trafikservoj.

Estis la komerco, kiu faris la trafikon profitdona kaj donis tiel al la homoj tiujn interligilojn, kiuj kondukas individuojn al reciprokaj renkontiĝoj, interkonatigas ilin, lasas la homojn kompreni unu la aliajn kaj stimulas kompreniĝon.

*

Eksterlanda komerco estas grava por la situacio de lando. Tial ŝtatoj influas ĝin. Ŝtata agado estas nomata: politiko. Do ekzistas fako de ŝtata agado: la eksterlanda komerca politiko.

Kelkfoje la registaroj havas apartan ministerion nur por tiu fako. La eksterlanda komerca politiko estas decida por la bonfarto aktuale kaj longperiode de la tuta popolo.

Eksterlanda komerca politiko estas subfako de la ekstera politiko de ĉiu ajn ŝtato. Ĝi do lokiĝas en la centro de la politiko decidanta pri la ŝtata sinteno al aliaj landoj kaj internaciaj organizaĵoj.

Tio ankaŭ koncernas streĉitecojn aŭ malstreĉiĝojn. Komerco estas do firme ligita kun la tuta komplekso de eksterlandaj rilatoj kaj eksteraj dependecoj.

La monda enplektiteco de unu popolo en la familion de ĉiuj popoloj surtere antaŭkondiĉas iun komprenon pri kio ek-

zistas kaj kio okazas aliloke. Same kiel la individuo renkontas la fremdon per eksterlanda komerco kaj lernas el tio kaj komprenas, ankaŭ tutaj popoloj kaj iliaj gvidantoj estas subigitaj al tiu procezo. De tie venas influoj al la individuoj en iliaj landoj mem. Tio plifortigas la efikon de komerco direkte al kompreniĝo.

Eksterlanda komerco kreas dependojn de landoj inter si. Se liverantoj de ne malhaveblaj partoj de iu propra produkto aŭ de nepre bezonata nutraĵo sidas en eksterlando, estas taŭga sinteno akordiĝi unu kun la alia.

Stato kun malbonaj intencoj devas forigi la situacion ne povi mem fari ĉiujn siajn necesojn. Kiam regas tiu stato de kompleta ekonomia sendependeco, oni nomas tion aŭtarcio.

Atingi aŭtarcion apartenas al la militpreparoj. Nazia Germanio sekvis politikon de aŭtarcio dekomence. La sama registaro malpermesis Esperanton, por ke unuopuloj disponantaj pri tiu bonega ilo de translima korespondado kaj internaciaj konversacioj ne havu rektajn ŝtate ne kontrolitajn kontaktojn al eksterlando. Al aŭskultado de eksterlandaj radiostacioj sekvis persekutoj kaj eventuale la mortpuno.

Eksterlanda komerco ne estas izolita fenomeno, sed parto de ĉiuj eksteraj rilatoj. Kiu kontraŭas eksterlandan komercon, tiu malboniĝas eksteren direktitajn komprenkanalojn.

Malamikaj rilatoj al eksterlando koincidas

kun subpremo de eksterlanda komerco. Laŭ tiu ekvacio sekvas, ke bonajn internaciajn rilatojn akompanas amika klimato por intensa eksterlanda komerco. Tiu interdependeco estis jam plurfoje demonstrita.

Ju pli granda la eksterlanda komerco, des pli fortaj la bonaj rilatoj inter ŝtatoj kaj popoloj. Tiu ĝenerala evoluo povas kulmini en komuna merkato. Tiam la eksterlanda komerco transformiĝas al enkomunaĵa komerco, speco de enlanda komerco.

Tio ne estas facile atingebla. La ekonomiaj avantaĝoj ja estas grandaj, sed tio ne estas rekte konstatebla de la civitanoj.

Ili informiĝas unuavice, ke ilia patrujo fordonas suverenecon almenaŭ parte al nova superŝtata instanco. La de ili elektita registaro ne plu estas ĉiopotenca, sed kunregas komuna gvidorgano, kiu estas elektita de plimulto de eksterlandanoj.

Ke granda parto de la civitanoj de lando apogas tiun politikon de rezigno pri suvereneco por integriĝo kun eksterlandanoj, estas ne simpla afero. Devas esti fido en la bona volo de la estontaj kunkomunaĵanoj. La homoj devas kompreni ilin kaj la intencojn de la kunfandiĝo kun ili. Ili devas havi kompreniĝon por la tuta situacio kaj por ĝia evoluo.

Tio estis problemo en ĉiuj ŝtatoj, kiuj kuniris la vojon al la Eŭropaj Komunaĵoj. Ĉiu paŝo bezonis voĉdonadon ĉu en la parlamento ĉu en publikaj balotoj.

El la historio ni scias, ke ne ĉiuj

voĉdonadoj kondukis al kunlaboro, sed okazis rifuzoj. La kaŭzo por tio estis la timo, ke la novaj kunuloj en la komuna merkato estus neharmoniaj kun la propraj ecoj. Tio estas evidente afero de kompreno kaj kompreniĝo, kiu ĉifoje mankis.

Sed en la landoj kunagintaj kreskis paralele la interŝanĝo de varoj kaj servoj - antaŭe: ilia eksterlanda komerco - kaj la sento de kunuleco, de komuneco, de samapartenateco.

El eksterkomunajaj landoj, des pli el ekster Eŭropo, la Eŭropaj Komunajoj estas rigardataj kiel nova politika unuo kun siaj "civitanoj". Nature en la landoj formantaj la komunajon la sento hejmiĝas, ke tio vere estas la fakto.

Kiam eksterlanda komerco nun estas io enlanda, ankaŭ la eksterlandanoj estas nun samlandanoj. Tio evoluis sur la bazo de pliiĝinta reciproka kompreno al kio sekvis kompreniĝo.

*

Eksterlanda komerco estas ĉie praktikata. Ja tre forte partoprenas riĉaj landoj en okcidenta Eŭropo, norda Ameriko kaj orienta Azio. Kompreneble la socialismaj ŝtatoj siatempa kunagis: la nova politiko de Sovetio ĝuste volis fari ĉion pli travidebla dum la lando transformiĝadis - grava kaŭzo por tio estis la komparo kun aliaj pli progresintaj landoj, kies produktoj videbliĝis per eksterlanda komerco.

Ankaŭ la Tria Mondo estas enplektita en la eksterlanda komerco, parte kiel komerc-

partneroj, parte ankaŭ en formo de evolu-
helpo. Tiu vasta kampo ne estas traktita ĉi
tie *). Sufiĉas la konstato pri ilia ĉesto
en la mondmerkato.

Aldona argumento por la amplekso de
eksterlanda komerco estas la fakto, ke plej
forte ĝuas ĝiajn avantaĝojn devizohavaj
riĉuloj kaj politikaj decidantoj. Ekzemple
Hindujo estas mizerstata lando kiel tuto,
sed ekspertoj taksas, ke proksimume 10 % de
la enloĝantoj estas pli malpli bonstataj.

Tiuj estas pli ol 70 milionoj da hindoj
kapablaj partopreni en la eksterlanda
komerco. Tia kvanto de homoj egalas al
granda industriŝtato.

Do se la eksterlanda komerco ne estas
sentebla de ĉiuj homoj, tamen la gvidaj
tavoloj de ĉiuj popoloj bone scias pri
ĝi kaj ĝiaj avantaĝoj.

La aserto ĉi tie estas: la eksterlanda
komerco kontribuas al kompreno. Tion ĝi
faras ne per iu magia forto, sed per
konatigo de faktoj el eksterlandoj. Tiuj
estas varoj kaj servoj kaj ankaŭ rektaj
homaj kontaktoj principe ekonomiaj.

Scioj pri eksterlandoj tiel akiritaj estas
la bazo por la kompreno de fremduloj. La

*) la aŭtoro pritraktis tiun temon detale en
la Internacia Kongresa Universitato de la
Universala Kongreso de Esperanto 1980 en
Stockholm. Tiu prelego estis presita kiel
la artikolo "Internacia Ekonomia Diskrimi-
nacio / Diskriminacio pro hejmlando" en
la libro "Diskriminacio", Rotterdam 1984

eksterlanda komerco do kunportas komprenon, ĝi malfermas situacion, en kiu kompreno povas evolui.

De kompreno al kompreniĝo estas granda paŝo. La unua frazo de tiu ĉi teksto estis: Kompreniĝo estas anima rendimento - al kiu kontribuas sentoj kaj menso.

La eksterlanda komerco ne estas marĝena afero en la vivo de ĉiu individuo, sed ĝi markis profundajn spurojn en ĉiu homo. Ĉiu palpas ĉiutage eksterlandajn varojn, ĝuas eksterlandajn servojn kaj renkontas eksterlandajn laboristojn.

Konsiderante tiun influon de eksterlanda komerco oni ja rajtas konkludi, ke komerco stimulas kompreniĝon. Tiu konvinko pri la sekvo de kompreniĝo el kompreno certe estas optimisma.

Sed ĝi venas el la sama konvinko, kiu atribuas al la Internacia Lingvo Esperanto, la komprenilo, kompreniĝan efikon. Do ne estas mirige, ke esperantista preleganto aŭdacas tiel argumenti. Komerco stimulas kompreniĝon.

*

Tiu ĉi tezo estis unuafoje prezentita kiel prelego dum la Internacia Kongresa Universitato de la 73-a Universala Kongreso de Esperanto je la 29-a de julio 1988 en Rotterdam

E k o n o m i a f o r t e c o

k o n t r a ù

k u l t u r a d i v e r s e c o

Kiam la homoj en iu ajn angulo de la mondo aŭdas la vorton kulturo, ili rekte pensas pri literaturo, teatro, pentraĵoj, klasika muziko, baletoj, skulptaĵoj. Tiuaj kreaĵoj de la homa spirito ja estas la elstaraj esprimaĵoj de kulturo.

Sed lerte kombinita kaj preparita festmanĝo estas same pruvo pri kulturo, kaj pri tio lingvoj aplikas la nocion tablokulturo. Jam tio montras, ke la vorto kulturo priskribas aron da fenomenoj, kiuj vaste etendiĝas ĉirkaŭ la homo.

Homoj vivas kune, kaj evoluis difinitaj formoj de kunvivado. Ties kutimoj estas grupformigaj kaj tipaj por tiu ĉi grupo. En ampleksa homogeneco ekzistas preferataj manĝaĵoj, la tablokulturo, identaj formoj loĝi, la loĝkulturo, similaj vestaĵoj, parte popolkostumoj kaj parte la vestostilo.

Regas specifaj formoj de kondutoj kaj sociaj rilatoj, kiuj atribuas poziciojn al virinoj, infanoj, maljunuloj, laboristoj. Ĉio ĉi estas la kulturo de homgrupo.

Dum kulturo pli estas la spiritaj kreaĵoj de homoj, la socia akcento retroviĝas en la vorto civilizacio. La du nocioj proksimas, sed ne estas la temo ĉi tie

por tion detaligi.

Kio estas unu kulturo, tio varias en la tempofluro kaj laŭ la regionoj. Ĉiu unuopa kulturo ŝanĝiĝas en sia historio. Per sia kulturigo, ekzemple la edukado, la homoj mem metas la bazon por aliaj formoj de kunvivado kaj novaj faritaĵoj. Elemento kun granda efiko en tiu proceso estas la ekonomio. Tiel unuafoje renkontiĝas la du gvidvortoj el la titolo de tiu ĉi pritrakto.

En sinkrona alrigardo evidentiĝas la ekzisto de multaj diversaj elformiĝoj de kulturoj: la kultura diverseco. Necesas nun difini, kio estas unu kulturo kaj kio la alia. Por tiu laboro estas bezonataj elementoj, kiuj en siaj kombinaĵoj kun siaj kulturoj ebligas la limfaradon.

Multaj kulturaĵoj estas nur lingve esprimblaj, ekzemple la literaturo, kaj la kunvivado de homoj en ilia kulturo okazas sur la bazo de lingva interŝanĝo. Tial ekzistas forta ligiteco inter difinita kulturo kaj ĝia lingvo.

Lingvo kaj kulturo estas ĝemeloj, kaj tiel ili estas ĝenerale instruataj en la universitatoj, kie la kultursciencaj fakoj nomiĝas ekzemple: francaj lingvo kaj kulturo (aŭ: literaturo, kiel unu fenomeno de la tuta kulturo).

Apliki la saman lingvon, tio kunigas ankaŭ kulture: sendependiĝintaj ekskolonioj kun principe memstara kulturo tamen adoptis grandajn kulturpartojn de siaj eksregantoj, ligantaj sin al ili per ilia lingvo, kiel

ekzemple la ŝtatoj de la mondo parolantaj aŭ la francan aŭ la anglan lingvojn.

Tio estas pli forta ekzemplo ol la kazoj de homoj kun sama lingvo sed vivo en diversaj kulturoj: la judoj aŭ la esperantistoj. Ambaŭ esceptoj tamen posedas ĉirkaŭ siaj lingvoj ankaŭ kulturan identecon.

Tre multaj vivkondiĉoj troviĝas en forta interligiteco kun la ŝtata ordosistemo, al kiu estas ankaŭ subigita la lingvo per normigaj paŝoj de ŝtataj instancoj. Tiuj ŝtataj influcentroj super la lingvo plej ofte nomiĝas Ministerio pri Kulturo. Ĝi ankaŭ regas multe de la evoluo en la nacia kulturo, inter alie per subvencioj en la ŝtata buĝeto.

Tial la elformiĝo de kulturo okazas ĝenerale en la limoj de ŝtatoj, al kio povas aldoniĝi samkulturaj minoritatoj en najbaraj sed fremdaj ŝtatoj. Ne estas malĝuste paroli pri nacia kulturo, ekzemple la greka kulturo, aŭ la meksika.

La ekzisto de: kulturo en sia lingvo, kaj de: nacia kulturo, jam montras, ke kultura aparteno ne estas iu ununura ligiteco de homo. Aldoniĝas, ke pli grandaj grupoj de inter si diversaj kulturoj havas komunajn fonojn. Tiuj plej profundaj radikoj de kulturo estas la grandaj religioj aŭ mondkonceptoj.

Unu esenca kulturo de la homaro estas tiu de la Kristana Okcidento (por la aŭskultantoj: la esprimaĵo estas propra nomo kun majuskloj, kun ne aŭdebla diferenco inter la simpla sundirekto okcidento kaj la

kulturformiga nocio Okcidento, kiun aliaj lingvo ol Esperanto bildigas plastike: ekzemple la germana dirante La Kristana Vesperlando).

Same esencaj por la kultura evoluo de siaj adeptoj estas la aliaj religioj, inter ili la intensiĝanta islamo. Provoj de modernaj sampretendaj mondkonceptoj kiel la marksismo ĵus evidentiĝis nur malforte kapablaj.

Sur la mondo vivas apude tuta aro da kulturoj, inter kiuj videbliĝas konstateblaj limoj. Ĉar ĉiu kulturo estas elformiĝo de la homa spirito, ne estas eble decidi pri ĝia ajn rango de valoro.

Tamen ekzistas diferencoj. Kelkaj el la kulturoj estas malgrandaj laŭ homkvantoj sed ili tamen klare reliefiĝas: ekzemple la hungara, la tibeta, la skandinavia. Aliaj nombras multajn anojn: ekzemple la usona, la ĉina.

Ofte restas kiel demando, ĉu nacio, lingvo aŭ homgrupo kun similaj trajtoj havas sian kulturon mem aŭ ĉu temas pri aneco en pli granda kulturo. Esperantistoj memoras el la rakontoj de prof. Lapenna pri la UNESKO-rezolucio el 1954 la siatempan diskuton pri la urugvaja kulturo.

Por la ĉi tie disvolvita pritrakto de ekonomia forteco kaj kultura diverseco sufiĉas la konstato pri la fakto de kultura diverseco.

La daŭra evoluo de ĉiu ajn kulturo okazas per pluevoluigado de ĝiaj propraj internaj

elementoj kaj per influoj el la ekstera mondo, do de aliaj kulturoj. Kulturoj elradias kaj emas transporti siajn specif-
aĵojn en la kampojn de aliaj kulturoj.

Okazas kultureksporto. Gi konsistas el kulturvaroj kiel ekzemple libroj aŭ produktoj de la kuirarto aŭ vestaĵoj (konkrete: la ĵinzoj) kaj el la spirito entenata en la kulturaĵoj, ekzemple la vivmaniero montrata en eksportitaj filmoj.

Kulturo kapabla elradii povas ekspansii, kaj ke tio ekzistas havas kiel antaŭkondiĉon, ke aliaj kulturoj regresas. Al la jam fortaj kulturoj aliĝas la progresantaj, kaj la jam malfortaj kulturoj venas en la danĝeron de kompleta malgraveco aŭ eĉ de malapero, kiu nomiĝas kultura genocido.

Multaj kulturoj klopodas ekspansii, kaj iliaj ŝtatoj entreprenas multajn aktivadojn por videbligi sin en eksterlando. Tio estas la unu flanko de la medalo.

La alia estas la akceptopreteco de la ricev-
ontoj. Tiu akceptemo varias, kaj ofte ĝi estas nula aŭ almenaŭ malgrandega, kio signifas, ke okazis informado sed ne estis farita impresio.

La elradiemon bone vidas la socio uzanta Esperanton: la ŝtate subvenciitaj revuoj kiel El Popola Ĉinio, aŭ La Espero el Koreio, kaj la ŝtataj radioprogramoj el Pollando, Svisujo, Aŭstrujo kaj aliaj landoj aŭ eĉ la religia influo venanta de Radio Vatikano.

Oni ja lernas detalojn pri tiuj landoj kaj

kulturoj. Sed estas aliaj kulturoj, kiuj faras fortajn impresojn sur fremdulojn kaj instigas al imitado, ekzemple la usona. Ĝia lingvo, la angla, estas giganta kulturportanto. Prof. Lapenna bedaŭris, ke liaj verkoj en la serbokroata restis kvazaŭ nepublikigitaj eĉ se ili estis science gravaj, dum ĉiu artikolo en la angla kontribuis al lia famo kiel sciencisto.

Kultureksporton ĝuas la usona kulturo kaj civilizacio kaj kun ĝi la angla lingvo, la francaj kulturo kaj lingvo, la germana lingvo, kaj ankaŭ sed pli malforte aliaj lingvoj kaj kulturoj.

Ekspansion nun travivas la Islamo, kaj pli-vastiĝas seneklezia humanismo. Aliaj religioj kaj la granda amaso de la kulturoj kaj lingvoj de la mondo restas en siaj limoj sen ke fremdaj homoj venas sub iliajn influojn.

Ĉar ekzistas tiu disdivido de kulturoj en disradiantajn kaj hejme katenitajn devas esti elementoj ligitaj al la kulturo, kiuj distingas la progresantajn disde la stabilaj aŭ regresantaj.

La unua supozo estas, ke la laŭ la homnombro fortaj kulturoj tiras fremdulojn en siajn kondutarojn. Multnombreco kiel super-rego estas natura fenomeno.

Koncerne kulturon ĝi evidente ne validas. La du plej grandaj kulturoj, samtempe ŝtatoj kaj parte ankaŭ lingvoj, estas la ĉina kaj la hinda. Aliaj multnombraj ŝtatoj, lingvoj kaj kulturoj estas ekzemple la indonezia, la brazila. Ili ĉiuj ne posedas modelan

karakteron por anoj de aliaj popoloj, do ili estas kvankam grandaj tamen sen influo super aliaj kulturoj. Grandeco ne ludas rolon.

Dua supozo ligas kulturan hegemonion al la rolo de mondpotenco. Nur kelkaj ŝtatoj estas politike kaj militiste fortaj kaj povas devigi aliajn sekvi ilian vojon. La ĉefaj potencoj de la nuna mondo estas la 5 konstantaj membroj de la Konsilio pri Sekureco de Unuiĝintaj Nacioj.

Sed inter ili estas Ĉinio, jam priparolita, kaj Sovetio. Pri tiu lando regis ĝenerala konvinko, ke ĝi unuecigis ruse la kulturojn de siaj respublikoj kaj ke ĝiajn kulturon kaj lingvon adoptis la orienteŭropaj ŝtatoj kaj aliaj membroj de la Konsilio pri Reciproka Ekonomia Helpo. Nun ni scias, ke tio estis nur ŝajno; ĉefe la esperantistojn interesas, ke la pozicio de la rusa lingvo estas ne forta, sed spongeca.

Kiam militista potenco premas landon tre longe, ĝi povas anstataŭi la proprecon de la indiĝenoj per siaj ecoj. Tio ne estas nutranta kultura influo, sed subpremado.

Portugalujo sed ĉefe Hispanujo enkondukis tiel siajn religion, lingvon kaj kulturon en Latinameriko, la usona kulturo ensuĉis la indianojn, kaj nin en norda Eŭropo kaptis la romia kulturo.

Religioj estas misiemaj kaj senĉese klopodas trovi novajn kredantojn ankaŭ kun la efika helpo de armitoj. La kombinaĵo de militista forteco kaj daŭro de ĝia regado efikas, sed tio estas ĉapitro el la historio de la homaro, ĉar tiel longe daŭranta militista

dependeco nun ne povas restadi.

La tria supozo koncernas la ekonomian fortecon, kaj ĝi troviĝas jam en la titolvortoj de tiu pritraktaĵo. Ekonomia forteco estas facile priskribebla, ĉar la ekonomio estas dokumentita en statistikoj.

Nekontestite sep ŝtatoj estas la ekonomie gvidaj potencoj de la mondo. Ili formas la 'Grupon de la 7' kaj ĵus kunsidis en Houston en Teksaso/Usono de la 9-a ĝis la 11-a de julio 1990. Temas pri Usono, Kanado, Japanujo, Federacia Respubliko Germanujo, Britujo, Francujo kaj Italujo.

En ili loĝas 12 % de la homaro, kiuj produktas 55 % de ĉiuj varoj kaj servoj ofertitaj sur la terglobo. Por ne devi nombri iliajn kulturojn, la lingvoj de tiu gvidgrupo estas la angla, la japana, la germana, la franca kaj la itala, do entute nur 5.

El ili havas eksterlandan signifon nur la angla kaj la franca kaj nun iomete kaj en paralela kresko kun ĝia ekonomia signifo la germana, sed ne la japana kaj ne la itala.

La japana lingvo estas apenaŭ lernata en eksterlando, kaj same la itala. Iliaj du kulturoj malgraŭ la ekonomia elstareco de la du ŝtatoj Japanujo kaj Italujo ne elradias senteble sur aliajn kulturojn. Tio ankaŭ aserteblas pri la brita kulturo, dum ĝia lingvo, portanto ankaŭ de la usona kulturo, posedas mondan signifon. La franca kaj germana kulturoj kaj lingvoj ja havas siajn influojn eksterlande, sed vere grandaj tiuj ne estas.

El tio venas kiel konkludo, ke ekonomia forteco ne estas la esenca kaŭzo por kultura influo super aliaj homoj. Jam nur la kontraŭekzemplo Japanujo estas konvinka. Dum forta ekonomio ne nepre signifas kulturenan influon, valoras rigardi malfortajn ekonomiojn kun la demando, ĉu eble inter ili iuj floras kulture ĝis la eksterlandoj.

Io tia ja ekzistas. Forte ekspansianta kulturo en la nuna historia epoko sen vera ekonomia bazo estas la Islamo. La sukcesoj de la islama fundamentismo eĉ kunportas materian malriĉiĝon por la konvinkitaj kredantoj, kiuj tamen subigas sin sub tiun religion, kiu estas aparta kulturo entrudanta sin en ĉiujn facetojn de la vivo.

Resume necesas konstati, ke malgraŭ la ĝeneraleco de la supozo pri ekonomia forteco kiel antaŭenpuŝilo por la al ĝi ligita kulturo ne validas iu ekvacio, laŭ kiu ekonomia forteco identas kun kulturpremo sur aliajn kulturojn.

Jam la du kontraŭekzemploj montris, ke ne ĉiu forta ekonomio antaŭenigas monde sian kulturon (la kazo de Japanujo) kaj ke tute malforta ekonomia bazo ne malhelpas fortan ekspansion (la kazo de Arabio kaj la Islamo).

La rezulto el tiu ĉi esplorado estas, ke mankas ankoraŭ la elemento apud la ekonomio, kiu estas bezonata, por ke unu kulturo estu sekvida fare de apartenantoj de aliaj kulturoj.

Tio devas esti elemento, kiu estas entenata kaj en la usona kaj en la islama kulturoj. La supozo sin altrudanta estas, ke temas pri

la modela karaktero por la imitantoj, kiuj ŝatas vivi tiel, kiel tio estas kutima en tiuj kulturoj.

Fakte multaj homoj en la industriaj socioj de la nuna mondo opinias la kulturon de Usono ekzemplodona. Por memori, komence en tiu ĉi pritraktaĵo estis klarigite, ke la nocio kulturo signifas la tutan vastecon de la vivoformoj kaj iliaj esprimoj.

Do la mondanoj, kiuj memvole metas sin sub la influon de la usona kulturo, montras per tio, ke ankaŭ ili volas tiel vivi, en plena individua libereco, kun ampleksaj ofertoj sur ĉiuj merkatoj, ankaŭ eble eĉ ĉefe rilate kulturon, kun ŝancoj kaj riskoj, en la vivosento de senlima lando kun riĉeco de vario.

La modelo estas ŝatata. Tial la usona kulturo elradias, trovas novajn adeptojn, stampas la mondon, usonecigas multajn individuojn ĉie ajn sur la tero.

En plena kontrasto al tiu ekzemplo la kulturo, la vivstilo, la manieroj, kiuj estas tipaj por Japanujo, ne estas sentataj kiel dezirataj modeloj por la propraj vivoj, kaj tial, pro mankanta ŝato, la japana kulturo ne povas elradii malgraŭ la elstara ekonomia forteco de Japanujo. Male, la japanoj apartenas al tiuj mondanoj, kiuj pli forte metas sin sub la influon de la usona kulturo.

En aliaj kulturkondiĉoj homoj sentas la usonan kulturinfluan kiel danĝeron por sia propra identeco en sia historio. Ili volas konservi la sistemojn de siaj sociaj rilatoj kaj juraj preskriboj, la viv-

modelojn de siaj prapatroj.

Fakte kultura identeco, tio estas la aparta elformiĝo de la kulturo de grupo, estas pli kaj pli ŝatata modelo. La ŝtatoj de unuiganta okcidenta Eŭropo fieras pri sia kultura multeco kiel konsekvenco el kultura diverseco, kaj ili volas konservi tion malgraŭ la multaj unuecigaj paŝoj en la Eŭropaj Komunaĵoj.

La dezirataj kultura kaj kun tio lingva multecoj estas argumento ĝenerale prezentata kontraŭ la aspiroj por Esperanto. Tamen, la multaj naciaj kulturoj de okcidenta Eŭropo apartenas ĉiuj al la Kristana Okcidento kaj troviĝas ĉiuj sub la influo de la usonaj kulturo kaj lingvo.

Multe pli purismaj estas la homoj en evoluantaj landoj, kies timoj antaŭ fremdiĝo al si mem estas esence pli grandaj. Sub tiuj kondiĉoj la kulturo de la Islamo travivas nun grandan revekigon. Tio ne havas ligojn al ekonomia forteco kaj pravas tiel la mankantan paralelecon.

Kiam la unuopaj kulturoj evoluas kaj kelkaj el ili fariĝas pli fortaj je la kostoj de multaj aliaj, tiam do ne estas la ekonomia forteco, kiu determinas la iradon de la aferoj. Kaj kiam iuj lingvoj akiras ĉiam pli firman pozicion kiel mondlingvoj, tiam tio ne estas simpla koincido kun ilia ekonomia signifo.

Ekonomio ne estas kondiĉo por kulturo. Tio tamen ne signifas, ke mankas la rilatoj inter ambaŭ kampoj. Ekonomia bonfarto de socio, tio estas ekonomia forteco de la

Ŝtato de tiuj homoj, estas tre grava elemento por antaŭenigi la kulturon de ĝia socio.

Kun forta ekonomio la kulturo povas flori sed ĝi ne devas nepre elradii. Sen almenaŭ kontentigaj ekonomiaj kondiĉoj la kulturo havas nur esceptokaze ŝancojn prosperi, eventuale eĉ elradii. La ekonomia forteco favoras siajn kulturojn en la selektado pri pluvivado, kaj tiel ekonomia forteco efikas kontraŭ la grandnombra diverseco de kulturoj. La titolo entenas ĝustan aserton.

Tamen, la diverseco reduktiĝas je tiuj kulturoj, kies bazo estas ne sufiĉe stabila, kaj tio ĉefe koncernas ekonomion. Do por konservi kulturen diversecon necesas bazo en la ekonomia forteco de plejeble multaj kulturoj. Sed tio estas ne atingebla, ĉar ekonomia forteco estas ne facile havebla.

Tial pro diferencaj ekonomiaj fortecoj la kvanto de diversaj kulturoj, tio estas la kultura diverseco, falos ankaŭ estonte. En tiu senco la ekonomia forteco ja decidas pri la sorto de sia kulturo.

Ekonomia forteco estas kombinaĵo de multaj homoj kaj de ilia riĉeco. Ĉe riĉaj socioj kun malforta homa bazo kiel la skandinaviaj landoj mankas la sufiĉa ekzemplodona kvanto da kulturaĵoj. Ĉe homamasoj sen riĉeco kiel en Hindujo mankas la sufiĉa kulturproduktado kaj ĝia elmontrado al la eksterlando.

Sed en riĉaj landoj troviĝas la grandaj merkatoj. Pro la multeco da aĉetantoj floras libroeldonado kaj teatrovizitado. La postulado sur la kulturmerkatoj instig-

as siajn proponadojn de la kulturkreantoj.

Kiam la vivo sur tiu ĉi merkato estas vigla kaj kulturaĵoj oftas, tiam kelkaj el la amaso restas kiel malefemeraĵoj por ĉiuj. Konkrete, el 300 teatropremieroj pli verŝajne 3 dramoj evidentiĝas kulturaĵoj kun intereso por la tuta mondo, ol kiam la tuta kvanto da premieroj estas sume nur 3.

Granda merkato signifas intensan konkurencon. Per ĝi okazas jam enlande elserĉo de aparte gravaj kulturaĵoj. Ankaŭ tio helpas al la elstarigo de la eksportindaĵoj. Ju pli signifa estas la landinterna merkato pri kulturaĵoj, des pli certe estas, ke inter ĝiaj aperaĵoj troviĝas produktoj, servoj aŭ ideoj por la kultureksporto.

La vivoj de kulturo kaj de sciencoj estas interplektitaj, kaj ĉiu universitato estas loko de kulturo. Kiam temas pri riĉa lando kun multaj enloĝantoj, ĝia universitata instruado estas vigla. Multaj profesoroj lekcias, kaj multaj studoj, fakaj revuoj kaj sciencrangaj lernolibroj aperas.

La multeco validas koncerne la vastecon da fakoj kaj koncerne la diversecon en ĉiu el ili. La materialo je dispono estas abunda. Aldona konsekvenco de tiu ĉi abundo estas la alta nivelo de la plej elstara parto de la tuta disponeblaĵo.

Kontraste al tio en malgranda aŭ malriĉa lando ne estas multa studmaterialo. Tial ofertiĝas por la malfavoratoj partopreno en la scienca riĉeco de la ekonomie grandaj produktantoj.

Kondiĉo estas lingvoscio. Tial usonaj lernolibroj estas en uzo en multaj landoj surtere, kaj ĝia lingvo, la angla, estas la universitata lingvo almenaŭ en la pli superaj semestroj multloke. Tio estas rekta kultureksporto de lando A al lando B, kiam studentoj kaj kandidatoj de la lando B lernas el libroj destinitaj por la kondiĉoj de la lando A, kaj eventuale eĉ ekzameniĝas en la lingvo de la lando A.

Riĉaj landoj estas tiaj pro la alta evoluŝtupo de siaj teknologioj. Ili kapablas produkti varojn kaj disponigi ilin al la civitanoj de siaj landoj favorkoste. Libro same kiel fakrevuo estas spirita produkto, sed ĝi estas ankaŭ teknika faritaĵo. Kun progresinta tekniko, kiel ĝi ekzistas en ekonomie fortaj landoj, estas pli facile disponigi ilin por la publiko.

Al la disponigo apartenas firme la distribuado, dependa de funkcianta komercado sur ĉiuj ŝtupoj, kaj de funkcianta trafiko. Trafiko estas parto de la ekonomio. Ekonomie fortaj landoj posedas bonajn trafikvojojn kaj veturilojn sur retoj kaj stratoj kaj en la aero. Ĉar la kultura vivo necesigas kunvenigi homojn, por kio estas bezonata funkcianta trafiko, denove ekonomia forteco favoras sian kulturon.

Multaj kulturaĵoj estas ankaŭ teknikaĵoj. Ekzemple elektronikaj instrumentoj faras nemalhaveblan kontribuon al kulturproduktado. Ili estas la iloj de kulturo. Kiu havas tiujn kulturilojn en progresinta stato, havas per tio elirbazon por progresinta kulturo. La filmproduktado estas grandega komercaĵo, kiu estas ebla nur por

riĉaj socioj. Sed filmoj montras ekzemplodonajn vivojn, instigas la homojn kopii la montritajn scenojn en siaj propraj vivoj. En tiu senco ĝuste la filmindustrio efikas sur la kulturojn de aliaj landoj.

Kun la granda teknika eltrovaĵo, la televidilo, filmoj eniris la loĝoĉambrójn de la homoj kaj fariĝis kontinuaj influiloj pri kiel formi sian vivon. Tiel televidfilmoj fariĝis la plej efika kultureksporto de la nuntempo. La prosperigaj efikoj de forta ekonomio al la kultura florado estas jam malnova fenomeno. Aldoniĝis la ebloj el la elektronikaj eltrovaĵoj. Nun la teknologio de komunikado aldonas novan puŝon antaŭen ankaŭ al kultura elradiado.

La komunikadaj sistemoj ĉirkaŭiras la teron kaj premas ĝin al unueco. Principe ĉiu kulturo povus informi pri siaj okazaĵoj, ĉiu civilizacio pri siaj eventoj. En la tuta mondo la homoj sidas antaŭ siaj televidiloj ĉiutage por ensorbi la interesaĵojn de la mondo.

Sed ĉe ili alvenas ĉefe raportoj el la riĉaj landoj, kaj pri la granda resto de la mondo aperas nur tiaj informoj, kiuj estas raportindaj por la spektantoj en la riĉaj landoj. Tiel elformiĝas la bildo pri la mondo de hodiaŭ, kaj ĝi aspektas kvazaŭ la spegulbildo de la kulturoj en la malmultaj ekonomie gvidaj landoj.

Esceptoj estas ŝtatmonopolaj informfontoj celantaj al nur la subuloj de tiu ĉi ŝtatpotenco, sed tiuj enloĝantoj preferus esti en la monda fluo de la televidaj bildoj. Krom tiuj esceptoj, spiono el alia mondo

sekvanta la ĉi-mondajn elektronikajn informilojn devus kredi, ke la monda kulturo estas relative homogena kun Usono kiel ĉion stampanta modelo.

Tio havas plurajn kaŭzon. Unue premas la kvanto kaj la kvalito de informado kaj filmliverado el okcidentaj fontoj. La taggazetoj kaj revuoj, la televid- kaj radiokompanioj el tiuj ŝtatoj havas siajn korespondantojn ĉie, kaj ilia devo estas rapide raporti por la hejma publiko.

Kio "okazas" en la mondo, tio estas tiuj aferoj, pri kiuj raportas la grandaj novaĝ-agentejoj, kaj ili domicilas en la okcidentaj landoj. Tiu fakta hegemonio estas ĝena ĉefe por mondorganizaĵo kiel UNESKO.

Tial leviĝis la diskuto pri Nova Monda Komunikada Ordo, la deziro, ke el ĉiuj anguloj de la mondo, de ĉiuj kulturoj venu la informoj, kiuj konsistigas la bildon de la nuna mondo.

Sed la provoj de aliaj landoj, reale: de la ekonomie malfortaj landoj, fiaskis. Tio validas por la ŝtatoj de la tiel nomata Tria Mondo, aŭ de iu kontinento ekzemple nigra Afriko, aŭ de la bloko de la ne aliancitaj ("neŭtralaj") landoj.

La dua kaŭzo por la malfunkciado de tutmonda informado el tiuj landoj, do por la mizera stato de mondegala informado, troviĝas sur la flanko de la suferantaj ŝtatoj mem. Ne nur ke al ili mankas ekonomia fortenco, sed estas fakto, ke sufiĉe ofte tiuj landoj volas havi nur tiajn raportojn, kiuj plaĉas al iliaj registaroj.

Kiam studentoj demonstraciis sur la ĉefa placo de Pekino en junio 1989 kaj la germanaj radiostacioj informis ĉiuhore pri la plej lasta stato, mi enŝaltis la Esperanto-sendaĵon de Radio Pekino: tie estis legata novelo. Jen, kiel en nukso, la kaŭzo por la hegemonio de informkanaloj el la ekonomie fortaj landoj kun ilia varia informbranĉo. Statistikoj pri la aŭdantaroj de la mallongondaj sendostacioj kiel BBC, Voice of America, Deutsche Welle subtenas tiun rimarkon.

Kultureksporto koincidas kun lingvoinstruado. Nur kies lingvo estas alilande konata, tiu povas kun siaj kulturaĵoj facile atingi fremdulojn. Lingvoscioj ebligas al eksterlandanoj ekkoni la kulturan vivon de alia lando, kaj ekscii estas la unua etapo al plujaj paŝoj, kiel esti impresita, esti imponita, inklini al kopiado, enpenetri en la eksterlandan kulturon.

Tial la disvastigo de lingvoscio estas unuaranga antaŭkondiĉo por kultureksporto. Principe ĉiu lando devas mem zorgi pri la eksterlanda instruado de sia lingvo, kaj multaj faras tion, inter alie per lingvoinstruadaj kaj kulturkonatigaj institutoj kiel Instituto Italiana, Goethe-Institut, Institut Français, British Council kaj diversaj aliaj.

Favorata estas tiu lando, kies lingvon la edukaj institucioj de fremdaj landoj elektis libervole kiel lernobjekton. Tiu feliĉa sorto falis ĉefe sur la anglan lingvon. Per tiu selekto de la lingvo de Usono el inter pluraj ebloj la avantaĝo kreita por la usona kulturo estas nemezurebla.

Aliaj lingvoj estas pli malmulte lernataj, iom ankoraŭ la franca, la germana kaj la hispana (la rusa troviĝas en aparta situacio), kaj post tiuj lingvoj lernataj kiel fremdlingvoj venas ankoraŭ grupo de maksimume dek aliaj lingvoj kun iel konstatablaj kvantoj da lernantoj kiel la itala, la portugala, la sveda, kaj inter tiuj troviĝas ankaŭ la Internacia Lingvo Esperanto.

Ekonomia forteco kaj ĝia efiko sur la evoluon de kulturo estas proceso, kiu senĉese plifortigas sin mem. La evoluoj de kulturoj okazas tute dise, kelkaj plifortiĝas, aliaj perdas. La kultura diverseco de la mondo do ne estas konstanta fenomeno, sed tiu diverseco montras sin en ĉiam diversaj ampleksoj.

Kie ekonomia forteco favoras sian kulturon, ĝi povas kreski, pligraviĝi, plifortiĝi. Kie mankas la ekonomia bazo por la kultura vivo, tie la kulturo plimalfortiĝas senĉese. Tio povas konduki ĝis la malapero de kulturo kaj per tio al malpligrandiĝo de la diverseco.

La sama konstato validas por la lingvoj. Iuj akiras novajn parolantojn, aliaj perdas, ankaŭ ĉi tie la evoluo iras ĝis la malapero.

Dum la Universala Kongreso 1989 en Brajtono en Britio angla profesoro konstatis, ke daŭre ie en la mondo komplete malaperas lingvo; li aldonis, ke preskaŭ ĉiam la venkinto estas la angla, al kiu lingvo li tial donis la kromnomon *killer language*.

Sin mem plifortigantaj procesoj estas unue apenaŭ rimarkeblaj, sed pli poste klare

videblaj, kaj ankoraŭ pli poste ili rapide kondukas al esencaj ŝanĝoj de la tuta konsisto de la kultura riĉeco de la mondo. Ni troviĝas nun en la menciita dua etapo kun la minaco de la tria. Ekonomia forteco estas survoje detruita la kulturenan divers-econ. Estas urĝa tempo prezenti ideojn kiel tion preventi.

La unu ero de la pritraktaĵo ĉi tie koncernis la kulturenan diversecon kaj la evoluon de tiu fenomeno al malgrandiĝanta kvanto en la diverseco. Tio estas konsekvenco ankaŭ el reciprokaj influoj de kulturoj inter si, ĉe kiuj iuj kreskas kaj aliaj perdas.

La pligraviĝo de iuj kulturoj okazas per la elradiado, per la diskonatigo, per la ekzemplodonado. La dua ero de la pritraktaĵo ĉi tie estis la ekonomia forteco kiel unu elemento en tiu ĉi evoluo.

Sed tio estas nur apoga faktoro de la kultureksporto. La kontraŭflanko de la dissendado de kulturo estas la ricevo, kiu okazas nur en la kazo de ekzistanta preteco akcepti. La akceptemo estas esenca demando en mondo de demokratiaj socioj, kie ne sufiĉas la vorto de unu ĉefo, ĉu reĝo ĉu diktatoro, sed en kiu tre multaj homoj devas esti konvinkitaj, ke io ofertita estas bona.

Cie la akceptemo ludas la decidan rolon. El multaj imageblaj situacioj nur unu ekzemplo servu al pliklarigo: ĉu estu novkonstruo de atomcentralo, tio estas nek teknika nek komerca decido, sed tute dependa de la akceptemo de la enloĝantoj.

La interdependeco de kultureksporto unuflanke kaj de akceptemo aliflanke ludis esencan rolon ankaŭ en la pritraktaĵo ĉi tie. Preta pludoni sian kulturon, tio estas karaktero de multaj se ne de ĉiuj kulturoj. Sed preta akcepti kulturinfluan, tio dependas de la ŝato, kiu direktiĝas al nur malmultaj kulturaĵoj.

La akceptemo koncerne kulturon estas la botelkolo en la tuta temo. Akceptemo koncerne fremdajn kulturojn estas raraĵo. Tio same validas por fremdaj lingvoj. Aldoniĝas ĉi-kuntekste la peno de lingvolernado, kiu metas aldonan barieron kontraŭ la akceptemo de fremdlingvoj.

Tial lingvolernado estas kaj restas afero de relative malmultaj homoj, eĉ se asertoj el la industriŝtatoj volas kredigi la kontraŭon. Esperantistoj scias pri la malmultaj kapabloj en fremdlingvoj ĝenerale, kaj ili ankaŭ scias, ke la akceptemo pri la ideo de neŭtrala internacia komunikilo estas la ĉefa bremsilo antaŭ disvastigo de Esperanto.

Disvastigemo unuflanke kaj akceptemo aliflanke estas ja decida paro. Sed en ilia dueco mankas ankoraŭ unu elemento. Por ke la akceptemo povu efiki, ĉu pozitive ĉu negative, devas ekzisti la scio pri la ebloj. Por eltrovi ĉu iu kulturo estas ŝatinda, la eltrovonto devas esti informita pri la granda vasteco de la kulturaj ofertoj.

Informado konsistas el la komunikado de la informajo kaj el la kompreno pri kio temas je la flanko de la informito. Kelkaj kulturaj informoj estas senlingvaj. Turisto

povas sperti aspekton kaj vivstilon de vizitata lando, ĝui ĝian arkitekturon, aŭdi ĝian muzikon, manĝi pro ĝia kuirarto.

Tial la turismo havas tre gravan lokon en la pritrakto de kultura diverseco kaj ties evoluo. Sed grandkvante kultura informiteco necesigas lingvajn kontaktojn. Ankaŭ la turismo pli efikas en kulturo kun lingvoscioj. Entute la regado de fremdlingvoj estas esenca elemento, kiam staras la demando pri kulturscioj antaŭ la decido pri akceptemo.

Komunikado estas ligita al ekonomia forteco. Lando kun riĉaj ekonomiaj rimedoj povas multe komuniki, ekonomie malfortaj landoj ne povas tiri la atenton al si. Komunikado okazas per lingvo. Lando kun sia lingvo eksterlande uzata havas la avantaĝon atingi la eksterlandanojn.

La internacia disvastiĝinteco de lingvo kundecidas pri la grado de informiteco pri ĝia kulturo en eksterlando. Tiel la jam ŝatata usona kulturo kaj la angla lingvo reciproke plifortigas siajn mondajn poziciojn.

En ilia kazo la respondo pri forteco en ĉiuj tri tavoloj de la bildo estas jes:

- la kultura elradiado estas forta kun forta ekonomio,
- la informoj pri tiu ĉi kulturo alvenas pro lingvoscio,
- la akceptemo eksterlande ekzistas pro ŝato de tiu modelo.

La situacio kun pravo en ĉiuj tri tavoloj estas escepta, kaj tial la kultura influo de la angla kaj de ĝia kulturo estas escepte

granda. Ke ĉiuj tri kondiĉoj estas plenumitaj, tio ne estas trovebla aliloke, kaj tio montras la malfacilaĵojn de ĉiuj konkurencantoj de la angla.

Ciuj tri tavoloj kontribuas nepre al la evoluo de la kultura diverseco en la mondo kaj meritas egalan pezon. Esperanto partoprenas en la kultura bunteco de la mondo. La socio de la esperantistoj posedas sian apartan kulturon, kiu ne ampleksas ĉiujn kampojn de homa kunvivado kaj kreado, sed estas tamen konstatebla.

Ankaŭ tiu ĉi Esperanto-kulturo emas elradii kaj trovi akceptemon ĉe la informitoj. Ĝi estas tute identa kun la lingvo, kies disvastigon la esperantistoj flegas.

Aldone al tiu aparteno al la fenomeno de kultura diverseco, el la vidpunkto de Esperanto la meza tavolo renkontas specialan atenton. Ĉiam kiam aperas la nocio informado Esperanto povas kaj volas esti la komunikilo.

El la ekzistanta kultura diverseco la plej multaj kulturoj, la naciaj kulturoj kaj la lingvaj kulturoj, devas prezenti sin al la internacia publiko en la klopodado akirities ŝaton. Tiaj sinprezentoj okazas en lingvoj.

Kiam la uzata lingvo estas la propra de tiu kulturo, ekzemple la bulgara, oni ne atingas la homojn en aliaj landoj, ĉar tiaj lingvoj estas nekonataj. Kiam la lingvo estas tiu de fremda ŝtato, ekzemple la angla, tiam la transportilo de la kulturinformoj havas siajn proprajn interesojn, nome zorgi pri

sia kulturinfluo. Tiel la uzo ekzemple de la angla lingvo por diskonatigi la bulgaran kulturon efikas nur parte por la bulgaraj intencoj, sed en aliaparto ĝi plifortigas la pozicion de la angla lingvo kaj de la usona kulturo, kio ja ne estis intencita.

Tiel oni restas en cirklo de diablo. Necesas elrompi el tiu ĉi ĉiama ripetado de tio, kio jam estas tro firmiĝinta. Alie la irado al regreso en kultura diverseco, la venkoiro de unu *killer language* ne estos malrapidigita aŭ entute ĉesigita.

Unu el la du konstituciaj elementoj de Esperanto estas ĝia neŭtraleco (la alia estas ĝia facileco). Kompreneble tiu ĉi neŭtraleco ne estas absoluta, ĉar Esperanto ne estas matematikaĵo, sed lingvo, kiu havas bazojn en ekzistantaj naciaj lingvoj, kaj Esperanto konstruiĝis kaj estas uzata en kultura ĉirkaŭo, kiu estas pli proksima al iuj kulturoj de la homaro ol al aliaj.

Ĝi estas lingva kaj kultura kompromiso kaj kiel tia atakebla, sed ĝi estas ekstreme eltenkapabla kiel tio estas karakterizaĵo de kompromisoj. Ĝi posedas la plej akcepteblajn ecojn de neŭtrala lingvo kaj senprobleme enviciĝas en mondo de kultura diverseco.

Pli vasta uzo de Esperanto kunportus novajn eblojn de konatiĝo kun plejeble multaj kulturoj de la mondo, kiuj prezentas sin en la kultura diverseco. La faco inter pludonemo de kulturo kaj akceptemo de kulturo fariĝus per ĝia apliko pli rendimenta. La sistemo de kultura diverseco gajnus.

La ekonomia forteco perdus iom de sia signifo en la disradiado de favorataj kulturoj. La titolo de tiu ĉi pritraktaĵo: ekonomia forteco kontraŭ kultura diverseco, perdus iom de sia vero.

Esperanto estas kulturaĵo. Apliki ĝin por la konservado de kultura diverseco, tio signifus, meti kulturaĵon en la lokon de ekonomia forteco. Tion alstrebi estas granda kaj malfacila laboro, sed ĝi indas la penon. Tiel la esperantistoj faras sian kontribuon por la kultura diverseco.

*

Tiu ĉi tezo estis unuafoje prezentita kiel prelego dum la Internacia Kongresa Universitato de la 75-a Universala Kongreso de Esperanto je la 17-a de julio 1990 en Havano/Kubo.

Aliaj verkoj pri ekonomiaj temoj
de la sama aŭtoro:

Internacia ekonomia diskriminacio, en: Diskri-
minacio, Rotterdam 1985

Konjunkturpolitiko (Inter senlaboreco kaj
inflacio), Hamburg 1989

Entrepreneo (Entreprenistaj strategioj, Pri-
skribo de la entrepreneo), Hamburg 1991

Trafiko (La merkato de la trafikservoj),
Hamburg 1992